


# HIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORO:  
S-RO MIGUEL A. ALTUNA

**Eksterordinara  
1975**

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.<sup>a</sup>  
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



HISPANA  
KANTARETO



# regiona kanzonaro

## V A L E N C J O

(Valencia)

Valencjo, estas lando de la lumo,  
de la amo kaj la flor'.

Valencjo, de la rozoj en virinoj  
estas ĉiam la kolor'.

Valencjo, ĉe l'odor', en viaj farmoj  
de la floro de l'orang',  
mi volus en la valencja kamparo  
amon trovi por ĉiam.

La blanka dometo, la flor' de l'orang',  
migdalarbe plenas la tuta kampar'.

La Turja arĝenta, ĉielo azura,  
la sun' en Valencjo amon donas al mi

La amoj en Valencjo estas floras  
kvazaŭ florplena buked'.

Ampruvoj, en Valencjo de virinoj  
estas amo la ofer'.

Pasioj, en la valencja kamparo  
se koron donas al vi

la inoj metas animon kaj vivon  
en la iervoro de l'kis'.

/La blanka... kampar'/

/Valencjo... flor'/

/la inoj... kis'/

(Asturias, patria querida)

Asturland', patruj' amata,  
Asturland', de l'amo mia,  
forgesi vin mi ne povas,  
mi tenas vin en kor' ĉiam.

Mi supreniros al arbo  
en kiu kreskas la flor'  
celata por l'amatino,  
ke ŝi metu ĉe l'balkon',  
Se ŝi metas ĉe l'balkon',  
se meti ĝin ŝi ne volos,  
mi supreniros al arbo  
kaj deprenos la floron.

## HIMNO

## ASTURIA

(Si vas a Calatayud)

Ĉar estis ema fari favorojn,  
kaj ŝin allogis ĉia junul',  
en kantoj aperis Doloroj,  
la flor' el kalatajud'.

Kaj kanzonet' trakuris la landon,  
hontiga kanto por bonvirin',  
kaj de tiu la bonan famon  
devas defendi nun mi.

Doloroj, la de l'kanzono,  
-tagon patreto asertis-  
estis virino de bono,  
mia edzin', panjo estis.

Voje al Kalatajud' / (bis)  
demandu pri in' Doloroj.  
Kanzoneto ŝin mortigis  
pro hontigo kaj angoroj.  
Diru ke mi tion diris,  
la filo de in' Doloroj.

Diras la homoj malbonintencaj  
min renkontinte ĉe via strat':  
patrinon li havis gajeman,  
Doloroj, tiu de l'kant'.  
Kun amo bona mi ŝin deziris,  
sed kalumnio hontigis ŝin.  
La famaĉo ŝin malpurigis  
per onidir', honta ŝlim'.

Kanto semanta la morton,  
el animo la malbenon!  
Malbona patrino sorto  
atingos en mi malvenkon.

/Voje al Kalatajud' / (bis)  
demandu pri in' Doloroj,  
faru kion mi deziris:  
sur la tombo lasu florojn.  
Diru ke mi tion diris,  
la filo de in' Doloroj.

V  
O  
J  
E

AL

K  
A  
L  
A  
T  
A  
J  
U  
D'

Palmisto, surgrimpu palmon,  
kaj diru al kara ino  
ke por ŝi mi havas amon  
kun radikoj en animo.

# KANARIA

Virgin' de Kandelarja,  
/la plej haŭtbruna/ (bis)  
etendanta protekton  
/sur sablon sunan/ (bis)  
Virgin' de Kandelarja,  
/brunulineto/ (bis)  
etendanta protekton  
/sur preĝejeton/ (bis)

# Kanzonaro

Jam ĉi-nokte ne lumas  
la lumfosto ĉe l'mar',  
jam ĉi-nokte ne lumas  
/ĉar al ĝi mankas gas'/ (3-foje)  
jam ĉi-nokte ne lumas  
la lumfosto ĉe l'mar'.



(Desde Santurce a Bilbao)

Mi de Santurco Bilbaon  
venas laŭlonge la randon,  
estas la jupo kuspita,  
montrante la tibikarnon.  
Mi venas haste kurante,  
ĉar min korsaĵo tro premas.  
Tra ĉiuj stratoj mi krias:  
Mi vendas!

sardinojn fraŝajn jen!

/Miajn sardinojn,  
bongustaj, ja-a,  
ĵus el Santurco  
alportis mi./

El etaĝ' iu min vokas:  
la najbarin' aĉetonta.  
Ŝi min demandas pri l'prezo  
de la fiŝaĵo vendota.  
Sed se mi diras ke kvaĉar  
ŝi min kontraŭas ke tri-i.  
Foriras mi kun la korbo.  
Mi vendas!

sardinojn freŝajn jen!

/Miajn sardinojn.../

# TUNA

(Tuna compostelana)

Pasas "tuna" en Santjago,  
kaj sonas mallaŭte priama rakont'.  
Poste la nokto reeŝe  
rapide transportas al ĉiu balkon'.  
Kaj en la templo de l' Apostol' Sankta  
knabino ploras antaŭ la Patron',  
/ĉar la mantelo de l' tuno amata  
ne portas de ŝi la broditan strion./ (bis)  
/Se "tuna" donas al vi serenadon  
ne enamiĝu, kara knabino,  
ĉar ĉiu stri' ornamenta mantelon  
enhavas pecon de iu kor'.  
Aj, tralarara, larara,  
ne enamiĝu, kara knabino,  
kaj lasu "tuna"n foriri,  
kun la tralararara./  
Nun la "tuna" lukse vestas  
kaj laŭtege sonas geedziĝa marŝ',  
sonas sonoriloj gloraj  
restante malplena Universitat'.  
Kaj en la templo de l' Apostol' Sankta  
ŝi al la studento edziniĝos jam,  
/galicanino plenplene feliĉa  
kaj nin aŭskultante jam ne ploros plu./ (bis)  
/Se "tuna" donas... tralararara./

A  
N  
U  
T  
A

K  
O  
M  
P  
O  
S  
T  
E  
L  
A  
N  
A

## Unu ELEFANTO

Unu elefanto sin balancigis  
pende de aranea reto,  
kaj konstatante ke ĝi rezistas,  
vokis alian kamaradeton.  
Du elefantoj...  
(Fine) Kaj konstatante ke ĝi rompiĝas  
ĉiuj lasis la ludeton.

(Triste, sola)

# trista

Gis la, ĝis la, ĝis la, barcelona urbeg',  
kie kun iluzi' mi studadis dum temp'.  
/ Gis la, Universitat',  
la horloĝon mi ne aŭdos plu./ (bis)  
La stratoj estas malsekaj,  
kaj ŝajnas ke pluvis ĵus, pluvis ĵus,  
estas larmoj de knabino  
pro amo perdita nun.

/ Trista, sola, sola restas la lernejo,  
trista, plorema, restas Universitat'.  
Kaj la libroj, kaj la libroj pruntlasitaj  
en la "monto", en la "monto de Piec'"/


Vi memoru kion ja mi diris  
sub arĝenta lumec' de ia luno,  
mi ne povas ami pli ol unu,  
tiu unu, ameg', estas vi.

sola

(La aŭrora)

A  
Ü  
R  
O  
R  
O  
R  
O

Kiam aŭror' etendas mantelon  
kaj en ĉiel' aperas azur'  
ne estas tiel brilanta stelo  
kiel lumanta via okul'.  
Hej! Aŭrora!  
se vi dormas,  
ĉe brakoj de l'iluzi',  
/ vekigu se vi dormiĝis,  
ja, brunulin',  
por kanzonon aŭskulti./ (bis)  
/ knabineto,  
ek al balkon'!  
ĉar mi tie atendas vin,  
por al vi ludi serenadon  
absolute nur por vi./ (bis)



# D i a n t e t o j



(Clavelitos)

Dianton volas nun mi,  
tiu flor' ĉe viaj lipoj,  
ĉar estas vero ke ĝi  
min allogas, karulino.  
Tintilon ricevas vi,  
mi promesas, ja, bebeto,  
se mielon donas vi,  
tiu ĉe via buŝeto.

/Diantetoj, diantetoj,  
diantetoj el la tuta kor',  
mi alportas diantetojn,  
diantetojn kun ruĝa kolor'.  
Sed se iam diantetojn  
mi ne povus alporti por vi,  
ne ekpensu ke mi ne vin amas,  
mi ne povis ilin deŝiri./

Vesperon en la mallum'  
mi vidis freŝan buŝeton,  
neniam en Santa Kruz'  
ekzistis tia beleco.  
Kaj je vido de diant',  
ornam' via ĉe l'ĉapelo,  
ŝajnis al mi, adorant',  
kvazaŭ peco el ĉielo.

/Diantetoj.../

/ (Pío, pío)

/Edziĝo mia okazos  
kiam estos mia plaĉo./ (bis)  
Vi devos enbalkoniĝi  
kiam mi vokos per:

/pio, pio, pio, papio, papio,  
pio, pio, papio, papa,  
paraparapa./

/Pro la malsato mortante  
kaj pro frosto tremegante,/ (bis)  
ĉi tie mi perdas tempon  
kantadante:

pio  
pio





/pio.../

/Se bopatrinon mi havos  
tio estos sub kondiĉo:/ (bis)  
se post jaro ŝi ne mortos  
mi ĵetos de la balkon'.

/pio.../

/Kaj jam finiĝas rakonto  
pri mia lasta intrigo./ (bis)  
Foriris ŝi kun alia,  
mi restis farante:

/pio.../

(despierta, nina)

/Vekiĝu, knabin', vekigu,  
vekiĝu se vi nun dormas,  
aperu ĉe la fenestro,  
ĉar studentaj kantoj sonas./ (Bis)

/Venu al balkon'  
kaj aŭskultu la kanzonojn,  
venantaj kore el animo,  
forte gajigantaj korojn./ (bis)

Sube de via fenestro  
estas granda belvidej',  
kie haltadas la "tuna"  
sopirante pro ameg'.

Jam nun vi estas ĉe lito,  
sed ankoraŭ ne en dorm',  
ni scias, nun vi aŭskultas  
la notojn de la kanzon'.

/Ne iru, ne iru  
kien la mar' kirliĝas,  
ĉar se marvento dolĉas  
pli dolĉa estas la am'./ (bis)

V  
E  
K  
I  
G  
U

KOLOR  
 PLENAJ  
 TROVIĜAS  
 LA  
 KAMPOJ  
 EN  
 PRINTEMPO  
 FLORA.  
 KOLORPLENAJ  
 LA  
 BIRDOJ  
 KAJ  
 PLANTOJ  
 EL  
 LA  
 LANDOJ  
 FORAJ.  
 KOLORPLENA  
 ESTAS  
 ĈIELARKO  
 POST  
 PLUV' EN  
 APRIL'.  
 /Kaj pro tio la buntaj koloroj,  
 variaj koloroj tre plaĉas al mi./ (bis)



(Las cintas de mi capa)

Se la ondoj iras kisi en rapid'  
 de la strando la sablerojn kun fervor'  
 de mi estas avidata per la kis'  
 via dolĉa lipa strando kaj amor'.  
 Se en fundo de l'minej estas metal',  
 kaj en fundo de la maroj la koral',  
 burĝonis en la profundo de l'anim'  
 la amego nun havata, ja, de mi.

/Sin plektantaj pro la vento  
 iras miaj mantelstrioj,  
 kaj kantante ĥore diras:  
 amu min, kara kanabino.  
 De l'mantel' estas la strioj,  
 de l'mantelo de student',  
 kvazaŭ son' de sonoriloj,  
 kvazaŭ son' de sonoriloj,  
 de vi en la proksimec'./

Ne demandu kiam mi ekkonis vin  
 nek pripensu la kialon de l'ameg',  
 mi nur scias: mia amo estas vi,  
 mi ne povas nun respondi pri la tem'.  
 Nun ne pensu pri la tempokaj kial'  
 de l'ekest' en koro mia de la am'.  
 Dank'al vi nun feliĉpleno estos viv',  
 sen am' via, karulino, mortus mi.

/Sin plektantaj.../

(De colores)

Kolorplenaj troviĝas la kampoj  
 en printempo flora.  
 Kolorplenaj la birdoj kaj plantoj  
 el la landoj foraj.  
 Kolorplena estas ĉielarko  
 post pluv' en april'.

KOLOR  
 PLENAJ

/Kaj pro tio la buntaj koloroj,  
 variaj koloroj tre plaĉas al mi./ (bis)

# AMERIKO KANTAS

(Alma, corazón y vida)

Memoro venas nun  
de nia renkontig',  
memoras mi vesperon,  
sed ne kiel antaŭ mi aperis vi.

Sed ja mi diras ke  
en amon falis mi  
pro la okuloj helaj  
kaj la buŝ' miela,  
plezureg' sen fin'.

En mia kanzono estas  
animo, koro kaj vivo,  
tion ĉi mi povas doni kaj ne plu.  
Ĉar bienon mi ne havas  
oferas nun mi ĉi tion:  
animon, koron kaj vivon kaj ne plu.

/Animon por vin allogi,  
koron por per ĝi amegi,  
kaj vivon por ĝin pasigi apud vi./ (bis)

a  
n  
i  
m  
o  
r  
o  
k  
o  
k  
a  
v  
j  
i  
v  
o

la  
aksoj  
de  
la  
ĉareto

(Los ejes de mi carreta)  
/Car mi la aksojn ne ŝmiras,  
jen homa mallaborem'./ (bis)  
/Se min knarado altiras,  
ŝmirad', senutila tem'./ (bis)  
/Mi ne bezonas silenton,  
neniun pensado celas./ (bis)  
/Min ne plu logas la tento,  
homaro jam ne min pelas./ (bis)  
/Estas afero tro teda  
senĉese sekvi la vojon./ (bis)  
/pluiri fojon kaj fojon  
en mia solec' obseda./ (bis)

La aksojn de la ĉareto  
neniam plu ŝmiros mi.

(Adiós, amigos, compañeros de mi vida)  
 Gis la, amikoj! miaj koraj kamaradoj!  
 kara frataro  
 de tempoj fruaj!  
 Fulme jam pasis nia vigla tempo juna.  
 Nun mi forlasas nian ĝojan vivon kunan.  
 Gis la, amikoj! Forte vokas jam la morto,  
 kontraŭ la sorto  
 ĉio neblas.  
 Triste fermiĝas antaŭ mi ĉiuj diboĉoj.  
 Malsana korpo ne plu vivos jam.

Alvenas en la menso  
 memoroj alitempaj,  
 gajaj ĝojoj momentaj  
 pasigitaj de mi,  
 ĉe mia kara panjo,  
 oldulin' pia,  
 kaj fianĉino mia,  
 amegita sen lim'.  
 Jes, ja, ŝi estis bela,  
 pli ol diin' ĉiela.  
 Mi en ama ebri'  
 donis koron al ŝi.  
 Sed estis tro ĵaluza  
 nia Sinjoro,  
 dronigis min en ploro,  
 forpasis ŝi.

ĜISLA

AMIKOJI

M N  
 I A  
 S Ĉ R  
 K E I  
 ) V  
 Ĝ E  
 I R  
 S O

(Yo nací en una ribera...)  
 Mi naskiĝis en la eno  
 de rivera komunum'.  
 / Estas mi frato de l' pumoj,  
 de la kardoj, de la rozoj / (bis)  
 / kaj de l' sun'. / (bis)  
 Kante, ride, plore, reve,  
 / kun diantoj de pasi / (bis)  
 kante, ride, plore, reve,  
 estas de mia ĉevalo  
 la mia amo la brid'.

(Recuerdos de Ipacaray)

En krepusko ruĝa mi vin renkontis,  
ĉe la blua lag' Ipakarai'.

Gvaranian kanton tiam rakontis  
vi en trista, sorĉega melodi'.  
Kaj efiko rava de la kanzono  
tuj renaskis mian amon al vi,  
kaj en nokto hela ĉe la plenluno  
el la blankaj manoj alfluis varm',  
per karesoj mildaj estiĝis am'.

MEMOROJ

DE

Kie vi nun estas, Kunjakai',  
mia dolĉa kanto ne ĝisas vin.

Kie vi nun estas,  
sen vi plurestas  
tristega mi.

IPAKARAI'

Cio rememorigas pri via am'  
ĉe la blua lag' ipakarai'.  
vian amon solan,  
ĉiam ĝin volas  
mi, Anai'.

(Yo vendo unos ojos negros)

M

I V

E O

N K M

D U I

A L G

S O R

J A  
N J

N

Mi vendas okulojn nigrajn,  
kiu volas aĉeti?

Mi nun vendas ĉar, sorĉemaj,  
ili katenigis min.

/Pli mi vin amus,  
vin amas mi,  
kaj la tutan nokton pasigas  
ame sopirante vin./ (bis)

Perfidaj okuloj nigraj,  
ne tiel rigardu min,  
tiel gajaj por aliaj,  
kaj tiel tristaj por mi.

/Pli.../ (bis)

Ciam ĉe malgaja stato  
mi iras al mara rand;  
por demandi al la ondoj  
ĉu tie vi estis, am'

/Pli.../ (bis)

LA  
N  
I  
G  
R  
A  
BLATO

(La cucaracha)  
/ /La nigra blato/(bis)  
jam ne povas iri plu,  
ĉar ĝi ne povas,  
ĉar al ĝi mankas  
el la postaj kruroj du./

Al maljunulino petis  
maljunul' aferon seksan,  
sed la virino respondis:  
mi pri tio estas eksa.

/La nigra... du/

Oni diras ke la vento  
same kiel virin' estas,  
ĉar ĝi ĉiam iras tuje  
kien pli da varmo nestas.

/La nigra...du/

Ie meze de l'arbaro  
juna paro de amantoj,  
kiam ili sin kisadis  
aŭdis sonojn de fekantoj.

/La nigra...du/

(Los días de la semana)

LUNDE post la matenmanĝo  
ludi iris infanin',  
tamen ŝi ne povis ludi  
ĉar ŝi devis tuje KUDRI

LA TAGOJ  
DE LA SEMAJ

/Kaj jen ŝi KUDRIS tiel ĉi,/(3-foje) MO  
ĉi tiel KUDRI mi vidis ŝin.

(ripetu la samon ŝanĝante nur la tagon kaj la laboroh)

MARDE...IRIKI MERKREDE...GLADI JAŬDE...LAVI  
VENDREDE...FRITI SABATE...SVABRI DIMANĈE.PREGI

Tiujn ĉi tradukojn ni dankas al Santiago Mulas,  
Tao kaj Asier.

En venontaj ordinaraj numeroj,ni publikigos  
pliajn tradukojn.